



Elekteblaj Kursoj de Esperanto en la "Universidad de Oriente"

Jesús Cedeño

Dum la semajno el la 26a ĝis la 30a de oktobro, 2009, okazis la unuaj klasoj de esperanto en la kerno Bolívar de la Universidad de Oriente en Bolívar-Urbo. La kurso estas elektelebla baznivela kurso de esperanto por medicinaj studentoj el la Lernejo pri Sansciencoj. Alia, progresinta, kurso komencos la venontan universitatan duonjaron, en aprilo 2010.

La kursojn proponis Prof. Jesús Cedeño (kiu instruas bioĥemion ekde la jaro 2001) en la jaro 2005. La Lerneja Konsilo aprobis la kursojn komence de 2006, sed mankis la finan aprobon fare de la Centra Komisiono pri Studprogramoj. Komencis, do, daŭran varbadon por la malfermo de la kursoj.

Ekde 2006 ofte aŭdeblas esperantlingvajn muzikaĵojn kaj podkastojn en la oficejo de Prof. Cedeño, kune kun klarigoj pri esperanto kaj la elekteleblaj kursoj jam aprobitaj de la Lerneja Konsilo. Tiel ekestigis aro de studentoj interesiĝitaj pri lernado de esperanto. La varbado ankaŭ atingis eksteruniversitatajn orelojn. La persisto ricevis sian premion pasintsemptembre, kiam la Centra Komisiono

finfine donis la oficialan permeson por malfermi la kursojn. Oni oferis du sekciojn, po 20 studentoj sekcio. Studentoj tuj komencis aliĝi la unuan kurson, kaj surprizan rezulton oni vidis. La 40 placoj por la kursoj estis rapide plenumitaj. Entute, pli ol 80 studentoj deziris aliĝi la kursojn, malgraŭ la fakto ke la oficiala anonco pri la malfermo alvenis nur tri tagoj antaŭ la registriĝo por la duonjaro.

32 el la 40 partoprenantoj plenumis mallongan enketon. Laŭ la rezultoj, 13% el la respondintoj iam aŭdis pri esperanto antaŭ ekscii pri la kuroj. 93% interesiĝis pri lernado de la lingvo mem antaŭ aliĝi la kurson; 4% aliĝis nur por la fakto ke temas pri kursoj gvidataj de Prof. Cedeño kaj la alia 3% aliĝis la kurson nur pro ne trovi placon en alia elektelebla kurso. Tamen, post la enkonduka leciono, ĉiuj partoprenantoj interesiĝas pri la lingvo mem.

Ĉiuj partoprenantoj de la kurso studis la anglan dum ties baza kaj/aŭ meza lernado, sed nur du vere scipovas paroli tiun lingvon kaj 5 aliaj povas iomete skribi aŭ legi anglalingvajn tekstojn. Ĉiuj esprimas dubojn kaj, samtempe, ĝojon post aŭdi pri lingvo kiun ili parolos kaj skribos post mallonga lernado. ★



Sekcio 2: Instruisto kaj studentoj



Sekcio 1: Instruisto kaj studentoj



LA INSULO DE NEMO (V)

Johano Negrete

17-a INTERNACIA ESPERANTO

Semajno de la kulturo kaj turismo

Liba Gabalda



Filven: Omaĝo al Jorge Mosonyi kaj la prezento de la Libro

"Eta Selektajo de Verkoj de Simón Bolívar"

Ricardo Coutinho

Naciaj kaj Internaciaj Novaĵoj



Enhavo

Fatala akcidento, grava perdo por ni Eta Selektajo de Verkoj

Pequeña Selección de obras de Simón Bolívar paĝo 3a

LA INSULO DE NEMO (V)

Johano Negrete paĝoj 4a kaj 5a

17-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

Liba Gabalda paĝoj 6a kaj 7a

Centro de la Kultura Diverco omaĝis al la fratoj Mosonyi

Raportis: Ricardo Coutinho paĝo 8a

94-a UK 2009 en BIALISTOKO

Liba Gabalda paĝo 9a

La 26-a INTERNACIA FESTIVALO EN NÖRDLINGEN Kadra temo: FABELOJ, FABLOJ KAJ LEGENDOJ

Liba Gabalda paĝo 10a

La misfortuna horo

elhispanigis Ricardo Coutinho paĝo 11a

Filven: Omaĝo al Jorge Mosonyi kaj la prezento de la Libro "Eta Selektajo de Verkoj de Simón Bolívar"

Raportis: Ricardo Coutinho paĝo 11a

DU ESPERANTO-KONGRESOJ EN HERZBERG LA ESPERANTO-URBO

Liba Gabalda paĝoj 12a kaj 13a

Elekteblaj Kursoj de Esperanto en la Universidad de Oriente

Jesús Cedeño paĝo 3a

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecaj iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligis al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



VENEZUELA STELO
Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio



VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A
telefonnumero 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

Redakcia Komisiono:
Johano Negrete, Esteban Emilio Mosonyi
kaj Ricardo Coutinho.

Grafikisto: Ramón Morales Castel.

Estraranoj:

Prezidanto: Johano Negrete.
Vic-Prezidanto: Juan Miranda.
Sekretario: Ricardo Coutinho.
Kasistino: Elizabeth Miranda.

Aldelegitoj:
Esteban Mosonyi
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).
Nancy Aquino (Eldonado).
Aguiles Rivas (Biblioteko).
Silvana Messori (Instruado).

Kunlaborantoj:
Jesús Cedeño.
Liba Gabalda.

FATALA AKCIDENTO, GRAVA PERDO POR NI

Jen mortis Jorge Mosonyi (26/08/2009) subite kaj absurde, nia kara prezidanto dum multaj jaroj kaj tre produktiva verkisto en variaj kampoj. Fatalo metis finon frue al lia vivo, kaj ne nur lia familio, ĉar ankaŭ ni ĉiuj en la **Venezuela Esperanto-Asocio**, same kiel en pluraj venezuelaj kulturaj organismoj kaj en la indiĝena movado, sentegis la perdon de tiu valora civitano. Jen perdo por ĉiuj ni verdestelanoj.

Jorge Carlos Mosonyi naskiĝis la 7an de februaro 1947 en Hugario kaj en lia frua infaneco elmigris al Venezuelo. Li fariĝis lingva antropologo, diplomito en la **Centra Universitato de Venezuelo**. En tiu ĉi institucio li profesoris pri lingvistiko. Dum multaj jaroj li estis ĉefulo de la "**Projekto de Indiĝena Lingvistiko de Venezuelo**", kadre de la **Instituto de Ekonomiaj kaj Sociaj Esploroj de la UCV**, kie li instruis kaj faris scienc esploron. Aŭtoro de multaj artikoloj kaj libroj pri lingvistiko, antropolgio, indiĝenaj lingvoj kaj pri la esperanta lingvo. Konsilanto kaj luktanto por la interkultura edukado kaj la indiĝena movado, antaŭenirigis elekteblan kurson de Esperanto en la Centra Universitato, membro de **Venezuela Esperanto-Asocio**, ĝia multfoja prezidanto kaj unu el refondintoj de la asocio dum la 1970aj jaroj.

Liaj kreaĵoj restas validaj. Kelkaj verkoj estas la jenaj: *Diccionario Básico de la lengua Karina*, *Kari'na*, *Caribes Ante El Siglo XXI*, *Manual de las Lenguas Indígenas de Venezuela*.

Ankaŭ li estas tradukinto de multaj indiĝenaj rakontoj por nia revuo (Venezuela Stelo) kaj unu el la tradukintoj de "Pequeña Selección de Obras de Simón Bolívar-Eta Selektajo de Verkoj de Simón Bolívar" (dulingva eldono en Karakaso, 2009). Li ĉiam krededis kaj laboris por nia verda ideo kaj hodiaŭ ni devas preni la torĉon.

Restu paco, trankvile, samideano Jorge, dum vi nun vojaĝas inter la ĉarmo de literoj, vortoj kaj frazoj en diversaj lingvoj, inter

anedkotoj viaj kaj indiĝenaj rakontoj kaj precizaj tradukaĵoj, kaj memoraĵoj niaj pri vi kaj kun vi.

Redakcia Artikolo




Jorge Mosonyi. Dua Venezuela Esperantista Rekontigo, 12/10/84. Biblioteko "Simón Rodríguez" Stratangulo El Conde

Eta Selektajo de Verkoj Pequeña Selección de obras de Simón Bolívar

Je Aŭgusto 2008, la Eldonejo El Perro y la Rana finigis la presadon de la hispana-esperanta verko Eta Selektajo de Verkoj de Simón Bolívar. Ĝi estas kompilaĵo de kelkaj gravaj dokumentoj de la Liberiginto de: Venezuelo, Kolombio, Panamo, Ekvadoro, Peruo kaj Bolivio; ili estas: *Manifesto de Kartageno* (tradukita de Andrés Turrisi), *Letero de Jamaiko* (elhispanigis Jorge Mosonyi), *Diskurso de Agostura* (tradukita de Andrés Turrisi), *Mia deliro sur Ĉimborazo* (esperantigis Esteban Mosonyi), la biografia sintezo de Simón Bolívar kaj la priskribo de la teksto estas elaboritaj de Jorge Mosonyi.

Ĝuste kelkaj tagoj antaŭ la bedaŭrinda forpaso de Jorge Mosonyi, li ĝoje ricevis la ekzemplerojn por **Venezuela Esperanto-Asocio** kiel kunlaboranta institucio de tiu ĉi eldonaĵo.





LA INSULO DE NEMO (V)

Johano Negrete

—Trankviliĝu, trankviliĝu, karulo! Vi estas ĉi tie kun mi, kun via amatino—, kaj tia dolĉeco en la voĉo de Munja kaj la kareso de ŝiaj manoj donis la impreson eksciti la sencojn de Nemo— Nu, jen do, ĉu vi ne diros al mi pri kio vi songis, se mi preparos por vi unu bieron de la fridujo?

Ŝi leviĝis por eksidi flanken de la lito. Tiam li rigardis en la helo de tiuj ĉambraj lunradioj la oran kaskadon kaj tiun neelteneblan belon de ŝiaj bluaj okuloj. Ŝi portis mallongan subrobon, sufiĉe dekoltitan por montri la rondecon de siaj mamoj.

—Ne, kara, dankon. Ne iru al la fridujo.

—Jes, plaĉas al mi trinki ion malvarman. Unu biero taŭgas. Ĉu vi ne deziras trinki kun mi kaj rakonti ion?

Li kapjesis, ĉar la subita dolĉeco de tiu virino facile fandis la viron. Tiam ŝi moviĝis por preni du malvarmajn bierbotelojn kaj revenis per koketaj paŝoj, farante paŭzon por scivoleme esplori lin dummomente. Tiam Nemo rigardis ŝian starantan korpon apud al la fenestro, kaj kontraŭlume la vidaĵo estis por li spektaklo, ĉar ŝia leĝera dormvestaĵo estis travidebla kaj li povis vidi ŝian tutan figuron, tiujn blankajn femurojn bele konturitajn kaj la triangulan helbluan kalsoneton, kiuj komencis eksciti Nemon.

Li haste saltis el la lito, kaj alproksimiĝis al ŝi. Prenis la botelojn kun glasetoj kaj lasis ilin sur tableton, senpacienca por liberigi siajn manojn, jam pretaj por ĉirkaŭpreni ŝian korpon; kaj tion li faris malantaŭ ŝi, apogante sian kapon sur ŝia kolo por kisi ĝin konstante kaj refreŝigi sin en kontakto kun ŝia kaskada hararo.

—Mi tre feliĉas ĉe vi, kaj deziras, ke tiu momento daŭrigu por ĉiam, karulino. Mi bezonas kisadi tiujn nerezistebajn mamojn, tiel belaj kiel blankaj kolomboj, miaj karaj kolomboj—. Li diris metante siajn manojn sub ŝian dormvestaĵon, ĝin levante por liberigi la nudajn mamojn, kiujn li knedis lante, delikate, dolĉe, ekscite, kaj gvidante ŝin al la lito, dum ŝi malforte plendetis:

—Kiom da rapido, karulo! Atendu! Lasu min trinki iom.

—Ne, tute ne—. Li levis ŝian supran vestaĵon ĝis la akseloj dum ŝi levis la brakojn por faciligi la taskon senvestigi ŝin. Nun ŝia torso estis nuda kaj li kliniĝis por leki la cicojn, kiuj rapide ŝveliĝis. Lia lango insiste moviĝis ĉirkaŭ la cicoj kaj ŝiaj manoj karese envolvis lian kapon.

Ambaŭ falis sur la liton plenaj de fascino. Sekve lia dekstra mano glitis ĝis ŝia kalsoneto, pasis al la pubo kaj milde masaĝis ŝian flavan papilion. Instinkte ŝi trembletis kaj fermis siajn femurojn. Ŝi ekscitiĝis kaj

sopiris kaj kisis lin forte sur la buŝo. Lia mano trairis plurfoje ŝian maldekstran femuron kaj revenis al la kalzoneto. Iom post iom, milde kaj delikate, li glitigis la etan pecon laŭ la tutaj gamboj de la ino, kaj ĵetis ĝin surplanken.

Nun ŝi komencis senvestigi lin, kaj li duonleviĝis. Unue la t-ĉemizon, kaj poste la ŝorton. En ŝia maldekstra mano ŝi manpremis la kreskantan kacon, kiu mirigis ŝin. Li elirigis longan sopiron kaj respondis karesante ambaŭ mamojn. Nun ŝi turniĝis al lia humida seksorgano kaj genuiĝis sur ĝin por apliki ŝian talenton.

—Kion vi donos al mi, se mi feliĉigas tiun sinjoron senpaciecan? Ĉu vi ofertas al mi nur unu bieron?—, kaj ŝi daŭrigis la dolĉan masturbadon.

—Beate kara, kia plezuro! Tiele, tiele, malmoligu ĝin! Sen fajro ne brulas eĉ pajlo. Faru do kara, faru!

—Kion vi pagos?

—Mi donacos la organon.

—Ĉu promesite?

—Promesite.

Konsekvence, ŝi aplikiĝis al la kaŭzo, kiu konsistis el leki unue kaj poste suĉi ritme la kacon. Li ĝuis senbride kaj sovaĝe kaj pli rapide la ino alternis masturbadon, suĉadon kaj kisdadon. Baldaŭ ŝi kondukis lin ĝis la limo de eksplodo, sed ŝi tuj haltis kaj diris kun anhelado:

—Mi volas ĝui interne tiun malmolaĵon. Venu sur min, karulo! Fiku min! Mi estas tute via.

Ŝi sekve etendis sin tute aperta sur la litotukon kvazaŭ floro de anemono. Ŝiaj femuroj kaj ŝoŝo malavare malfermiĝis por ricevi kaj doni vivon al la vizitanto per freza plezuro. Ŝia korpo brilis kiel spegulo de la luno. Kiam li turniĝis por situi sin sur ŝia tuta korpo, ŝi ĉirkaŭprenis sian viron per la kolo, brakumis lin kaj susuris ĉe lia orelo plifrenezigajn vortojn, kiuj bruligis lian pasion. Poste li ŝoviĝis ĝis la krispa arbetaro, kies fendo jam eligis varman sukton, kaj fingrumante ekfrotis ĝin singarde kaj disdonis kisetajn al la kara fendo de rozkoloraj lipoj, kaj sekve lekis ĝin intense ĝis fari ŝin atingi momenton de incendio.

Munja ĝemis kaj tordiĝis pro volupto, siaj mamoj streĉiĝis kaj preskaŭ perdis ŝi la konsciencan, kiam li ŝanĝiĝis kaj alkroĉiĝis al la korpo de la belulino por enpenetri ŝin dolĉe avancante ĝis la fundo de la mieltunelo. Ŝia floro fermiĝis preskaŭ instinkte por kapti la tutan predon, sed lia puŝado insiste grandigis la vojon al la ekstazo, ĉar nun la ŝoŝo senreziste iĝis plene malseka kaj glita.

—Ho! Kara, mi estas tute via, ĝuu min!

—Ĉu amas min?

—Jes, jes, amato! —diris ŝi kun ĝemeto.

Kaj Munja ĝuis avide, kaj ĝuigis lin movante ritme sian ventron por ke Nemo frotadu pli rapide la lancon kontraŭ la murojn de ŝia vagino. Li kisis samtempe ŝiajn lipojn, kaj penetrante ŝian buŝon serĉis perlangopinte kirli en la profundo de ŝia gorĝo. Ŝi kolombumis malespere kaj volis spiri apartigante ŝian buŝon, ĝemis kaj kriis pro doloro kaj plezuro.

Post longa tempo de sinregado, jam lia organo estis tute kaptita en la fundo de la viringo, kiam ambaŭ seksoj kuniĝis sen ebla retroiro, kaj ambaŭ puŝis forte por elĉerpi la fortojn de la alia kaj ambaŭ eksplodis samtempe ĵetante torentojn de varma likvo kaj vulkana fajro.

Dumminute ili dormetis en la sama pozicio por rekuperi fortojn. Sekve li forŝoviĝis kaj kisis tiun allogan buŝon kun dankega koro, kaj ŝi alkroĉiĝis al la lia kun fermitaj okuloj, dezirante eternigi tiun momenton de beleco en la profundo de sia animo.

Poste ili restis surdorse en la lito manenmane kaj kun kapoj kunigitaj. Munja havis la okulojn ebriajn pro satigita plezuro, kaj Nemo ŝovis sian manon sub ŝian kolon por turnigi ŝian vizaĝon, ĉar li volis rigardadi unufoje pli tiujn helbluajn okulojn, kiuj inspiris lin revii pri fantastaj bluaj mondoj. Li kisetis ŝiajn okulojn kaj ŝian frunton milde kaj mire.

—Karulo, kio estis tio, kion vi songis... kiu tiom ekscitis vin ami kaj seksumi?—diris Munja kun iom da senkonscia scivolemo.

—Ĉu vere vi volas, ke mi rakontu mian koŝmaron, kara mia?— Li rigardis ŝin fikse divenante ŝian intencon.

—Ne necese, kvankam iom strangas, ke vi transiris el terura songo al feliĉa sekskuniĝo.

—Aha, la songo estis tre oportuna por via plezurego, ĉu ne? Kaj kompreneble vi volas scii pri ĉio, kio profitigas vin.

—Ne diru, ke vi ne profitis pro la koŝmaro. Vi mensogus se tiel. Ĉu ne?

—La songo estis... estis longa kaj stranga, kaj se mi rakontas, mi devus ĝin simpligi.

Nemo rakontis ĝin dum chirkaŭ dek kvin minutoj, kaj kvankam li pretendis resumi, li ornamis la songon per pli da detaloj, kiuj iel ŝanĝis ĝin. Munja aŭskultis kun viva atento.

—Jen tio, kio okazis al mi kaj jen tiu stranga naŭzo, kiu faligis min el la turo. Kion povus signifi tia strangaĵo?

—Faru la amon kun mi, kara. Jen la signifo: mi estas via destino.

—Ne moku min, Munja! —li tiklis bruske ŝian ventron kaj ŝi ridis petegante lin halti— La rakonto,

kiun mi konfesis al vi dum la tago, transformiĝis en noktan koŝmaron. Kial?

—Nemo, tiu rakonteto estas pri sentimentalulo, kiu neniam povus forgesi la teneran unuan enamiĝon, kaj vi denove rakontas kvazaŭ se vi mem ne estus la protagonisto de la rakonto, tiu timema knabo, sed alia ulo laŭ vi. Ĉu ne? Tamen mi ĝuis ĝin, ĉar kiel onidiras: je bona fino, ĉio bona.

—Certe, vi ne havus kialon por plendi pri mia terursonĝo kun tiuj neatenditaj diaj rezultoj, nek pri la forlasitaj bieroj, kiuj jam varmiĝis.

Antaŭ respondi Munja prenis sian botelon de sur la tableto kaj trinkis iom pro lia memorigo, sed tuj sekvis jene:

—Tamen mi ĉiam havus iun dubeton pri tiaj viroj, kiuj sin montras tiel sentimentalaj. Ĉu vi konfesas, mia karulo, ke vi vere ne estis dum via juneco ia speco de Tenorjo? Mi ne kredas, ke vi baldaŭ ne havis alian enamiĝon post tiu epizodo kun Njeves

—Mi konfesas, ke mi ŝatintus esti unu el tiuj Tenorjoj; precipe por kontentigi vin, kara. Tamen neniu homo perfektas. Vi jam devus rezignacii.

—Ho, Nemo, vi ree cinikas! Hej, malbona filozofio la via, sinjoro mia! —ŝi mordetis lian ŝultron—Tamen, mi emas kredi iom pli el tiu historio, pro via bela intenco ne forgesi la knabinon. Tio montras, ke via koro almenaŭ ne tute tenorjiĝis.

—Kara, vi vere estas tre postulema! Dankon pro via indulgemo.

—Kaj vi, mia kara, estas tre konvinkema pri viaj teneraj sentoj! Do, mi devus esti singardema, kun klara kapo. Ho, vi viroj ĉiam fidus je niaj malzorgoj!

La konversacio daŭris ĝis preskaŭ la tagiĝo. Ĝi estis tiel bongusta kaj la geamantoj estis tiom distraj kaj amuzaj, ke ili ambaŭ ne sciis kiam halti kaj dormi. Tamen, apenaŭ la unuaj lumradioj aperis sur la maro kaj la flugo de la mevoj direktiĝis al la akvo aŭ —kiel diris la antikvaj grekoj— apenaŭ la matenruĝo alvenis, kaj anoncis la horon je kiu Apolo leviĝas kaj etendas siajn orajn harojn tra la horizonto dum la birdetoj ekkantas, Nemo kaj Munja, jam elĉerpitaj, finfine kapitulaciis kaj lasis siajn vivojn en dolĉa brakumo ĉe la volo de Morfeo. Samtempe la kantoj de birdoj kreskadis kaj iu mara venteto lulis palmojn, eble kiel verŝajna promeso al nia geparo, ke la Mastro de l' songo ĉi-foje alportu al ili tute belajn bildojn.

(Daŭrigota)





17-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

Liba Gabalda

3-10 de oktobro 2009
PINEDA DE MAR

Jam la 17-an fojon renkontiĝis la verda familio en Hispanio kaj ĝuis agrablan Esperanto-aranĝon en la ĉe-mara urbeto Pineda de Mar, kiu situas 55 km norde de Barcelono. La Semajno estis bone organizita de la triopo: Luis Serrano, Salvator Aragay kaj Santiago Torné. Ĉi-jare kolektiĝis 120 samideanoj el 13 landoj. Ni havis plezuron havi inter ni geedzan paron Norberto Díaz kaj Yoandra Rodriguez el Kubo. Ili prezentis al ni sian urbon Santi Spiritu kaj invitis la ĉeestantojn partopreni la Universalan Kongreson en Kubo venontjare en julio. Ni ĝuis belan Semajnon en la agrabla etoso de la tri-stela hotelo Stella sekvante la programon laŭ la Semajna informilo. Ĝi estis riĉa je eventoj kaj altkvalitaj prelegoj. Dum la dimanĉa inaŭguro bonvenigis nin la urbestro de Pineda s-ro Xavier Amor i Martín kaj ĉeestis aliaj du funkciuloj de la urbodomo. Ni komune fotiĝis.

Stano Marček - la redaktoro de la revuo Esperanto - gvidis E-kurson laŭ sia propra instrumentado. Lia verko estas tradukita kaj eldonita jam en 23 lingvoj. Tre interesa estis prelego pri arboj de s-ro Guillem Nicolas. Li klarigis al ni kiamaniere tranĉi branĉojn de arboj por ne damaĝi ilin. Grandan sukceson havis ateliero pri produktado de poŝtkartoj kiun gvidis Wolfgang Gunter. Li asertis, ke ĉiu homo estas artisto kaj la rezultoj pravigis tion.

La premio Ada Sikorska-Fighiera estas ĉiujare aljuĝita al la plej meritplena persono en la E-agado. La unuan fojonĝin ricevis virino - Katalin Kováts konata de ni ĉiuj kiel fervora esperantistino pri instruado kaj edukado de instruistoj. Surloke ŝi disdonis diplomojn al 2 sukcesintoj en la ekzamenoj faritaj dum la UK en Bjalistoko. Ŝi ankaŭ parolis pri la nova ekzamsistemo, prezentis filmeton rememore al forpasintoj kaj tre interese kaj detale prezentis al ni nederlandan pentriston Vincent Van Gogh. Li estas ŝia pasio. Ni multon eksciis pri la vivo de tiu fama artisto.

Alia interesa prelego temis pri la natursciencaj vortoj en PIV fare de tre sperta fakulo pri pluraj sciencoj, sed ĉefe pri biologio - Claude Roux el Francio. Li okupiĝis pri reviziado de la Plena Ilustrita Vortaro. Li konsilis ke estu enkondukitaj en ĝi mankantaj fakaj vortoj, malprobis arkaismojn. Li atentigis nin pri la bona uzado de kelkaj kutimaj vortoj. Dr-ino Rafaela Uruña tre serioze parolis pri la tutmonda klimatsanĝo, pri ĝiaj konsekvencoj kaj la danĝero por la tuta homaro.



Ŝi klarigis, ke la ekologia sistemo malekvilibriĝas pro tiu fenomeno kaj kaŭzas katastrofojn. Iom distra estis prezento pri Venezuelo fare de Liba (folklore vestita) kaj Floreal Gabalda. Ili prezentis serion da bildoj kaj du filmetojn. La ekspozicio de kelkaj artaĵoj, libroj, muzikiloj, kaj gustumado de gojav-dolĉaĵo kompletigis tiun plaĉan prezenton.

Dum la renkontiĝo ne mankis vesperaj programeroj. En du interkonaj vesperoj ni gustumis ĉampan-vinon kaj bongustaĵojn interbabilante kun konatuloj kaj novuloj. Dum alia vespero estis prezentita la opero Nabucco. Dum debato, la temo "Ĉu la estonteco de Esperanto troviĝos en Afriko" estis multe pridiskutata. Luis Serrano ankaŭ gvidis vesperon en kiu oni rajtis esprimi siajn opiniojn pri la Semajno, doni ideojn aŭ plendi. Sed estis ĉefe pozitivaj kaj laŭdaj vortoj. La plej ŝatata programero okazas ĉiam la lastan vesperon. Ni ĝuis muzikon de la konata ensemblo "Montjuic" kaj gustumis "cremat". Ĝi estas kataluna specialaĵo el spicita kaj bruligita rumo.

La tri ekskursoj konatigis nin kun aliaj partoj de Katalunio. La unua, duontaga celis laŝtonan urbeton Peratallada. La dua, aŭto-muzeon en Sils. Impresis vastega kolekto da malnovaj aŭtomobiloj. Ĉiuj eksponaĵoj laŭdire estas funkciaj. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Terrasa, kie ni vizitis muzeon pri Sciencoj en Katalunio. En la urbo Moia ni haltis ĉe la strato Esperanto kaj trarigardis privatan biblioteko-muzeon de Ramon Molera. Poste ni vizitis muzeon pri la historio de Katalunio.



17-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO Liba Gabalda



PINEDA DE MAR



17-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO



3.10 - 10.10. 2007



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



Centro de la Kultura Diverseco omaĝis al la fratoj Mosonyi

Raportis: Ricardo Coutinho

La Centro de la Kultura Diverseco (Centro de la Diversidad Cultural) inaŭguris La Forumon de la 100 Tagoj (El Foro de los 100 días). En tiu aranĝo, dum la tago la 23^a de oktobro 2009, okazis la Omaĝo al nia forpasinta prezidanto Jorge Mosonyi kaj nia samideano Esteban Mosonyi.

En tiu evento partoprenis la doktoro Victor Rago; direktoro de la fakdepartamento de Lingvistiko de la Lernejo de Antropologio de la Centra Universitato de Venezuelo, eksdekano de la Fakultato de Sociaj Sciencoj de la sama universitato, profesoro César Quintero, sociologo Rubén Montoya, antropologo Nemesio Montiel (Universitato de Zulio), diputito Guillermo Guevara (prezidanto de la komisiono pri Indiĝenaj Popoloj kaj prezidanto de la Parlamento Indiĝena de Ameriko), Luís Lambos kaj Benedicta Asís; ambaŭ reprezentantoj de la indiĝenaj popoloj en tiu ĉi prelego, ankaŭ Venezuela Esperanto-Asocio estis formale invitita.

Dum la omaĝo, la doktoro Victor Rago faris etan resumon de la verkaĵoj de ambaŭ omaĝitaj kaj iliaj specialaj kontribuoj al la Lernejo de Antropologio kaj Sociologio, fiera luktado por la renokono de la indiĝenaj rajtoj en tiuj ĉi profesioj, ĉar dum iliaj profesiaj komencoj laŭ la akademio la Indiĝena Luktado estis taksita kiel romantika kaj malgrava afero.

Poste, la profesoro César Quintero rimarkis la gravecon de la interkultura edukado kiel la kontribuo plej grava de la fratoj Mosonyi donis al la edukado de la lando. Aliteme, la diputito Guillermo Guevara enfazis la tute klaran direkton teoriantan en la verko de la fratoj Mosonyi pri la rekono de la politikaj rajtoj de la indiĝenaj popoloj.

Indiĝena Rakonto de la Pemono Popolo farita de Luíz Alberto Lambos, li venas de la Komunumo de Kavanajen' (Kavanayén), de la ŝtato Bolívar, kun la Kantoj kaj Dancoj pemon-taŭrepan' farita de Benedicta Asís y Concepción Urbina de la urbo Santa Elena de Uajren' (Uairén) de la ŝtato Bolívar finis la okazaĵo.



94-a UK 2009 en BJALISTOKO

Liba Gabalda

Pli ol 1800 kongresanoj el 63 landoj ĝuis vere eksterordinaran kaj elstaran kongreson en la naskiĝurbo de L.L.Zamenhof en Bjalistoko. Ĝi estis elektita por omaĝi la 150-an naskiĝjubilcon de la kreinto de Esperanto. Bjalistokanoj fieras pro tiu grava personeco. La tuta urbo eksciis pri nia evento. Stratoj estis ornamitaj per E-flagoj kaj pluraj afiŝoj ne povis esti ne rimarkitaj. Ankaŭ la urbanoj povis ĝui kelkajn E-aranĝojn okazantaj en la urbo kaj koncerton de Jomo kaj Kimo en la parko. La etoso kaj entuziasmo en la kongresejo estis grandega malgraŭ kelkaj incidentoj fare de iuj vandaloj. La konstruaĵoj de la Politekniko de Bjalistoko funkciis kiel kongresejo. Apude estis konstruita grandega tendo ekipita per ekranoj. Tie okazis la plej gravaj solenaĵoj kaj eventoj.

La inaŭguran ceremonion ĉeestis diversaj politikaj kaj urbaj aŭtoritatuloj kaj la partoprenantojn bonvenigis ankaŭ la nepo de nia Majstro. Dum la paŭzo intervenis trupo da talentaj gejunuloj kantante gajajn, melodiajn kantojn. Reprezentantoj de ĉiuj nacioj bondeziris al la kongresanoj en ilia koncerna lingvo "Pacon al vi".

La Movada Foiro ĉiam pligrandiĝas kaj la asocioj sukcese prezentas al la publiko siajn agadojn kaj planojn por la estonteco. La programo estis riĉega, ĉiu devis elekti laŭ sia intereso kaj povis ĉeesti nur parton de la abunda oferto. Grandan intereson de la partoprenantoj vekis la kleriga lundo dum kiu estis pritraktitaj interesaj temoj. Fakaj asocioj havis siajn kunvenojn, estis diskutata la ĉeftemo de la kongreso: "Krei pacan ponton inter la popoloj", la estraro kaj la Centra Oficejo respondadis demandojn de la publiko, estis prezentitaj filmoj, pola lingvo eksprese, prelegoj pri Pollando, okazis lingvaj kursoj kaj la Internaciaj Ekzamenoj. Vespere ni povis observi per teleskopo stelojn. Ne mankis la ŝatata aŭkcio jam tradicie kaj sprite gvidata de Humphrey Tonkin kaj aliaj interesaj prelegoj.

Ankaŭ la gejunuloj invitis nin al sia programo. La tuttagaj ekskursoj celis konatiĝon de diversaj regionoj de Pollando.

La Kongresa kuriero aperadis ĝustatempe kun diversaj novaĵoj rilate la kongreson kaj ekde la dua numero aperadis regule intervjuoj de konataj esperantistoj pri prognozo de evoluo de Esperanto ĝis post 50 jaroj. Perfekte funkciis poŝto kun speciala porokaza stampo kaj la poŝtaĵoj estis liveritaj per speciala trajno aŭ balono kun aldona stampo.

Paralele okazis muzika festivalo de kulturoj en la urba placo. Dum la semajno spektblis multaj artaj programoj. Iuj estis dediĉitaj al la juda kulturo. Tre impresa kaj bunta estis la Nacia Vespero. Al la publiko estis amplekse prezentataj muzikaj kaj dancaj tradicioj de Pollando el diversaj tempoperiodoj. Ankaŭ la bankedo, al kiu ni ĉi-jare aliĝis por festi nian 30-jaran geedziĝon la 27-an de julio, estis bonega kaj festena.

Ĉi-foje la plej malmulte kostaj loĝejoj en studentaj ĉambroj situis plej proksime (vid-al-vid) de la kongresejo, kio kontentigis la plejmulton de la partoprenantoj.

En la urbocentro okazis pluraj E-aranĝoj en la kafejo Fama, teatraĵoj en urbaj teatroj kaj multaj el ni vizitis la kafejon Esperanto. Urbocentre troviĝas turismaj informtabuloj pri lokoj ligitaj al la historio de Esperanto, ĉefe al la Majstro kaj la Esperanto-Centro ofertis ekspozicion pri la vivo de Zamenhof.

Resume, pri la ĉi-jara UK ne eblas paroli alimaniere ol per superlativoj. Dank' al la lokaj aŭtoritatuloj, LKK-anoj kaj multaj helpantoj ni povis ĝui modelan kongreson. Dum la tuta semajno regis entuziasmo, festa etoso kaj amikaj renkontoj. Malfacilis forlasi tiun belan lokon.


Esperable la tri kubanoj partoprenintaj la ĉi-jaran kongreson inspiriĝis kaj provos aranĝi venontjare same grandiozan kongreson en Havano. Ili promesis tion...



94a Universala Kongreso de Esperanto



25.7. - 1.8. 2009



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



La 26-a INTERNACIA FESTIVALO EN NÖRDLINGEN

Kadra temo: FABELOJ, FABLOJ KAJ LEGENDOJ 27.12.2009 - 3.1.2010

Liba Gabalda

La ĉi-jaran IF-on ni povas nomi fabelan. Ĝi okazis en belega bavara urbeto Nördlingen komplete ĉirkaŭita per mezepoka murego. Ni loĝis en novstila junular-familia gastejo situita tuj malantaŭ la muro. La urbo estis facile atingebla per piede. La ĉeftemo FABELOJ, FABLOJ KAJ LEGENDOJ revenigis nin en junaĝo. Ni aŭskultis historiojn kaj fabelojn de Andersen, de la fratoj Grimm, rusajn, latvajjn, dagestanajn kaj specialan bildfabelon pri ŝipeto Narklo kreita de niaj rusaj amikoj Anna kaj Dima.

La evento komenciĝis per interkona vespero kiun jam de pluraj jaroj animas Mikaelo Bronŝtejn el Rusio. Ĉeestis dudek novuloj kiuj rapide integriĝis al la grupo de jam konataj kaj regule partoprenantaj esperantistoj. La plej foraj venis el Japanio, Usono, Israelo, Rusio...

La libroservo de FEL (Flandra Esperanto-Ligo) ofertis plurajn librojn, muzikdiskojn kaj aliajn esperantajojn. Prizorgis ĝin Tina kaj Paul Peeraets. La "Knajpa" etoso apartenas al la plej gajaj. Ĉi-foje Harald, Jeon-ok, Vida, Bruno kaj HDP servis bieron, vinon, koktelojn...

Aŭtorajn horojn prezentis Lena Karpunina kaj Mikaelo Bronŝtejn. Pri la situacio en Afganio parolis Ulrich Brandenburg, pri Norda Koreio kaj porka gripo Harald Schicke, pri kajakado ĉirkaŭ insuloj Ugo kaj Annarosa el Italio, artan enpakadon per tukoj prezentis kaj pri ties historio parolis Masumi kaj Tacuo Huĝimoto el Japanio, memorindan jubilean IF-on en retrospektivo prezentis Brian Moon. Krom tio okazis vico da interesaj prelegoj. Estis prezentita baletto, mantrio, pianludado, matena gimnastikado Oni ofertis kurson de desegnado, paroligan kurson, ktp. Multaj interesiĝis pri vizito al la loka bierfabriko Ankerbräu, kie ĉiu vizitanto ricevis memore bierglasojn kaj kompreneble ili gustumis diversajn bierojn. Ankaŭ urbaj promenoj kolektis multajn

interesulojn.

Pluraj profitis oferton de surloka saŭnado. Jam la trian fojon okazis IVU (Internacia Vintra Universitato) kaj la duan fojon Internaciaj ekzamenoj laŭ la nova metodo, gvidita de Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar.

La ekskurso al Nürnberg bone kaj laŭ la plano disvolviĝis. La ĉiĉeronino detale rakontis pri interesaj vidindaĵoj. En la fama restoracio "Bratwurst Röslein" ni bonguste kaj abunde tagmanĝis. Restis sufiĉe da tempo por promenado tra la urbo.

Por dancŝatantoj Liba elektis muzikon en ritmo de flamenko kaj ŝi iniciatis lernadon de mazurko, kiu estis prezentita kun granda sukceso antaŭ la Silvestra balo. Dum la tradiciaj silvestraj bufedoj kaj baloj ĉiam estas okazo bone manĝi, babili, amuziĝi, danci kaj bonvenigi la diversajn novjarojn de la ĉeestantaj partoprenantoj. La novjara promeno celis rondiron sur la ĉirkaŭurba murego kiun gvidis Floreal. Li akompanis interesulojn al la 90 metrojn alta turo Daniel de kie bela vetero ebligis rigardon al la vasta ĉirkaŭaĵo kaj neĝkovrita urbo Nördlingen.

Krom la dagestana, rusa kaj la israela vesperoj dum kiuj ni estis regalitaj ne nur per kantoj, dancoj sed ankaŭ per tiulandaj bongustaĵoj ni ankaŭ festis la Zamenhofan 150-jaran datrevenon per interesa programo kaj ŝaŭmvino ofertita de nia organizanto HDP (Hans-Dieter Platz) al kiu ni tutkore dankas pro la brila organizado de IF-oj, kiuj iĝas jaron post jaro pli kaj pli perfektaj.

Kiel antaŭvidite, la festivalo estis ege sukcesa kaj mi invitas vin denove reveni ĉi-jarfine al la sama loko - fabela urbo Nördlingen- por festi la 27-an IF en agrabla kaj amika etoso. Dum la tuttaga ekskurso ni vizitos Munkenon.



26a INTERNACIA FESTIVALO



27.12 - 3.1.2010



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

La misfortuna horo

elhispanigis Ricardo Coutinho

Unua Parto

-Kia Honto! Kia Konto!

Diras Enriketa, kun la manoj sur la kapo, ŝi estas regita de la sufero, piediras tra la manĝoĉambro, tie ankoraŭ odoras je nardoj kaj lilioj de la funebra vigilo freŝdata.

-Fi! mia koro diris al mi, ne estas nature ke vi suferegis pro la morto de Adolfo. Vi ŝajnas la vidvino ol mi. Mi estis blinda kaj naiva! Kial mi ne konscii ke tio okazis? Perfidita de mia fratino, kaj en mia hejmo!

Amelia aŭskultas silente. Ŝi estas kun stuporo pro doloro; ŝiaj okuloj, kun malforta strabismo akvumita pro la langvoro, la kordoloro kaj plorego. Ŝi vidas nedirekte al ŝia fratino iri kaj reveni. Ŝi suferas pro ŝia kulpo; tamen ŝi ne pensas pri si mem; nek pensas pri la malfeliĉo kiu regis ĉiam en ŝia vivo.

Konfuziita pro la ĵaluzo, regita de la indigno kaj rankoro, Enriketa trudas al ŝia fratino konfesi kaj diri dolorajn verojn, kiu diras humile kaj obeeme kiel infano, eĉ kiam ŝi konfesas ke ŝi estas graveda.

Malgraŭ al ŝia dezirego, Enriketa ne gravediĝi dum edzina vivo. Ĉu tio ne estas kruelaĵo de la destino, krom la sengravediĝo, esti kokrita edzino, kaj eĉ

perfidita fratino? Tio estas la lasta; ŝi havas hontindan kialon!

La violento de ŝiaj sentoj venkas ŝin. Ploras dum longtempe kaj senespere; poste kun rego de si mem kaj trankvila pro la sana korelverŝo de ŝia interna tormento, ŝi diras al ŝia fratino kun ĵusa rezoluto:

-Do, mi klopodos solvi ion: almenaŭ la reputacion. Ni forlasos la domon, kien ĉiuj klaĉos pri nia honto. Ni translokiĝos al la kamparo ĝis kiam vi naskos vian filon. Kaj li estos mia. Mi mensogos kaj mi oferos min nur por savi vin de la honto... kaj...

Sed ni ne povas esprimi la veran senton, kaj aldonas: kaj liberigi al mi de la moko. Ĉar en tiu momento de heroa sinofero ne povas manki, por ke ŝajnus humaneca, la flanka sento de eta pasio.

Amalia aŭdas kun surprizo kaj ŝiaj okuloj larmiĝas: ŝia patrino instinkto mezuras ĵus la grandegan oferon kaj diras kun rezignacio:

-Do, Enriketa. Kiel vi derizas, li estos via.

Fonto: Rómulo Gallegos, *La hora Menguada en Cuentos Completos*. Karakaso, Editorial Panapo, 1987, pp. 219-223



Filven: Omaĝo al Jorge Mosonyi kaj la prezento de la Libro "Eta Selektajo de Verkoj de Simón Bolívar"

Raportis: Ricardo Coutinho

Je la 16^a de novembro 2009 en la Ferio Internacia de la Libro Venezuela (Feria Internacional del Libro Venezolano), okazis la omaĝo al nia forpasinta prezidanto Jorge Mosonyi kaj bapto de la libro "Eta Selektajo de Verkoj de Simón Bolívar", hispana-esperanta dokumentaro tradukita de niaj asocioj: Andrés Turrise, Jorge kaj Estaban Mosonyi.

Tiun eventon organizis la eldonejo El Perro y la Rana, Venezuela Esperanto-Asocio kaj Monte Ávila Editores. Malfermis la eventon Miguel Márquez, la prezidanto de la edonejo El Perro y la Rana, sekvis la la parolo de Carlos Noguera, prezidanto de la eldonejo Monte Ávila Editores, poste Raul Rivas Rivas legis lian laŭdindan omaĝeton al Jorge Mosonyi. Aliflanke nia sekretario Juan Miranda donis nian esprimon pri la evento kaj Esteban Emilio Mosonyi alportis kelkajn vortojn pri la kontribuoj de lia frato en la indigena kaŭzo.

Kaj je la fino de la okazaĵo ni baptis la libron, lasta kontruo de la esperanta organizita movado en Venezuelo al la disvastiĝo de valoroj kaj scio de nia lando al mondo.





DU ESPERANTO-KONGRESOJ EN HERZBERG - LA ESPERANTO-URBO

Liba Gabalda

28.5. – 3.6.2009

Fine de majo kaj komence de junio 2009 la Esperanto-urbo Herzberg am Harz gastigis samtempe du kongresojn. Nome la 8-an Eŭropan Esperanto-Kongreson kaj la 86-an Germanan Esperanto-Kongreson. La eventon partoprenis pli ol 350 geesperantistoj kaj centoj da artistoj kaj gastoj inter kiuj grupo da gelernantoj el la pola ĝemelurbo Góra. Krome, en tiu momento en Herzberg okazis la urba festo al kiu la esperantistoj estis invititaj. Dum la solena inaŭguro muzikis la loka gimnazia grupo. Krom oficialaj gastoj la kongreson salutis kaj sukceson deziris la urbestro Gerhard Walter, kiu jam parolas Esperanton. Pola delegacio invitis al la ĉi-jara UK okazonta en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof.

La programo estis tre ampleksa. Okazis multaj laborkunsidoj, prelegoj, lumbildaj prezentoj pri Japanio, Koreio, Kubo, amuzaj skeĉoj, informo pri AIS, seminarioj, Esperanto-ekzamenoj kaj ĉiuvespere abunda kultura kaj distra progamo. Por invititaj gastoj estis akcepto kun ŝaumvino. La gejunuloj havis apartan programon en la junulara domo al kiu ili ankaŭ invitis nin. Dum la unua vespero ni aŭskultis kantojn en greka kaj Esperanto lingvoj. El Hamburgo venis la fama kantisto Ralph Glomp, el Pollando Georgo Hanzlik, pupteatran prezenton pri barono "Münchhausen" ofertis Christoph Frank, folkora grupo el apuda vilaĝo Pohlde prezentis popolajn dancojn, la hungara parlamenta koruso kantis por ni hungare, polaj gejunuloj prezentis varian danc-spektaklon. En la urbodomo dum la ĉeesto de la urbestro estis prezentita la ĵus naskiĝinta himno por la kongreso fare de Kees Ruig el Nederlando. En la urba biblioteko estis instalita Esperanto-ekspozicio de privata kolektanto pri diversaj esperantaĵoj, sed ĉefe pri filatelio. Oni povis admiri rarajn leterojn, kompletan E-poŝtmark-kolekton kaj multajn fotojn pri diversaj E-aranĝoj. Ankaŭ en la urba kastelo eblis vidi ekspozicion pri Esperanto kaj la kastelan muzeon. Apartan intereson havis speciala poŝtstampo pri la E-kongreso. Ne mankis

informoj pri saniga efiko de ginsengo kaj multaj vizitis ginsengan vendejon kiun en Herzberg prizorgas Song Jeong-ok kun sia edzo Harald Schicke. Harald ankaŭ parolis pri sia vojaĝo al Norda Koreio kaj gvidis bierseminarion. Kelkaj restoracioj havis menuo-kartojn en Esperanto kaj iuj ofertis manĝaĵojn speciale faritajn por esperantistoj.

La plej granda kaj impona aranĝo estis la urba festo dum kiu diversaj grupoj feste kaj folklore vestitaj paradis tra la urbo. Ĝi estis bunta kaj gaja evento. Ankaŭ esperantistoj partoprenis tiun festparadon. Bone videblis flirtanta E-flago kaj verdaj ombreloj kun surskribo Esperanto. Pluraj el ni portis sur si flagon tiel markante de kiuj landoj ili venis. Ni estis multnombraj. Kantante kaj salutante la rigardantojn laŭvoje ni vekis intereson. Centoj da homoj eksciis pri Esperanto, eĉ aŭtomobilistoj devis atendi en longa vico dum nia marŝado sur la ĉefvojo. Por Herzberg ĝi estis sendube la plej granda Esperanto-evento iam ajn okazinta tie.

Dum la kongreso eblis partopreni plurajn ekskursojn urbajn kaj eksterurbajn. En la urbo Goslar ni admiris imperiestran palacon, belajn stratojn kaj la ĉefplacon. Alia interesa ekskurso gvidis nin al la Eŭropa Rozario en la urbo "Sangerhausen", kie ni promenis inter multaj rozoj kaj aliaj floroj. Revene ni haltis ĉe grandega kaj impona monumento "Kyffhäuser". Trajne ni veturis al la urbo Braunschweig, kie ni vizitis muzeon, katedralon kaj poste ni kafumis aŭ bierumis ĉe surstrataj terasoj. La lastan tagon esperantistoj renkontiĝis en la Esperanto-centro kiun estras Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy. Ni eksciis pri Esperanto-agadoj kaj atingoj en Herzberg kaj pri bezonoj por bona disvolviĝo de Esperanto tie. Herzberg estas alloga kaj pitoreska urbo ĉirkaŭita per Harzmontaro kun multaj turismaj kaj migrad-eblecoj.



DU ESPERANTO-KONGRESOJ EN HERZBERG - LA ESPERANTO-URBO Liba Gabalda



Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio